KVARA PASKA DIMANĈO – 25a de aprilo 2010

AL MIAJ ŜAFOJ MI DONAS LA ETERNAN VIVON – Komentario al Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

Joh. 10, 27-30

Miaj ŝafoj aŭskultas mian voĉon, kaj mi ilin konas, kaj ili min sekvas;

Kaj mi donas al ili eternan vivon; kaj ili neniam pereos, kaj neniu ilin forkaptos el mia mano.

Mia Patro, kiu donis ilin al mi, superas ĉion; kaj neniu povas ion forkapti el la mano de mia Patro. Mi kaj la Patro estas unu.

La lastan fojon kiam Jesuo troviĝas en la templo de Jeruzalemo la ĉefreligiuloj klopodas lin ŝtonmortigi kiel blasfemulon. Ni vidu la evangelipecon kaj ĝin ni enmetos en ĝian kuntekston.

Estas la festotago de la inaŭguro, en la hebrea lingvo Hanukkah, kaj estas la festotago de la lumoj. Dum ok tagoj oni flamigadis kandelabrojn kiuj lumigis la tutan urbon kaj rememoris la rekonsekradon de la templo fare de Judaso la Makabeo en la jaro 165a a.K.

Nu, dum tiu ĉi festotago la ĉefreligiuloj cirkaŭas Jesuon kaj demandas al li: "Ĝis kiam vi tenas en dubo nian animon? Se vi estas la Kristo, diru al ni malkaŝe". Ili volas scii ĉu Jesuo estas la Mesio, sed ili ne volas tion scii por lin akcepti sed por lin forigi. Kaj Jesuo malmilde ĉesigas tiun konversacion kaj li diras al ili ke ili ne apartenas al lia ŝafaro, ke ili ne estas liaj ŝafoj. Kial? Kaj jen ĉi tie la evangelipeco kiun la liturgio prezentas al ni ĉi dimanĉe.

"Jesuo diras: "Miaj ŝafoj aŭskultas mian voĉon". La religiestroj ne estas ŝafoj de Jesuo ĉar ili ne aŭskultas la voĉon de Jesuo kaj ne aŭskultas la voĉon de Dio. Jesuo jam diris al ili: "vi neniam aŭskultis Lian voĉon". La akuzo kiun Jesuo faras estas grava; la religiaj ĉefoj, la homoj taskitaj konigi al la popolamaso la volon de Dio estas tiuj kiuj ne aŭskultas la voĉon de Dio kiam Li parolas.

Sed Jesuo diras: "Miaj ŝafoj aŭskultas mian voĉon, kaj mi ilin konas", koni indikas rilaton de granda konfido, de granda intimeco "kaj ili min sekvas". Kien ili Lin sekvas? En la amo kiu fariĝas servo, ĉar ili aŭskultis en la voĉo de Jesuo la respondon al tiu deziro je pleneco da vivo kiun ĉiu homo enportas en sia animo.

Al tiuj kiuj sekvas Jesuon Li donos sian vivon mem, fakte Li diras: "Mi donas al ili la eternan vivon". La vivo nomiĝas "eterna" ne tiom pro ĝia senfina daŭro, sed pro ĝia ne detruebla kvalito. Jesuo certigas nin ke la morto ne interrompas la vivon. Ne nur ĝi ne ĝin interrompas sed permesas al ĝi ekflori en formo nova, kompleta kaj definitiva.

Kaj Jesuo ne diras ke li donos al ili la eternan vivon; la eterna vivo ne estas estonta premio, sed ĝi estas ebla realeco kiun oni devas sperti en la estanteco. "Kaj ili neniam pereos". Jesuo tion certigas

ĉar “Neniu ilin forkaptos el mia mano”. Jesuo en tiu ĉi evangelia ĉapitro sin deklaris kiel la ŝafiston, la ekzemplon de ŝafisto. Kaj kia estas la ekzemplo de ŝafisto?

Temas pri tiu kiu donas la vivon por sia ŝafaro, jen kial neniu ilin forkaptos el liaj manoj; Li estas la ŝafisto kiu donas la vivon por la aliuloj. Kaj Jesuo daŭrigas: “Mia Patro, kiu donis ilin al mi, superas ĉion; kaj neniu povas ion forkapti el la mano de mia Patro”.

Antaŭe Jesuo diris ke neniu ilin forkaptos el lia mano, nun li diras ke neniu ilin forkaptos el la mano de lia Patro. La mano de la Patro, la mano de Dio kaj tiu de Jesuo estas tute egalaj, ili estas la mano de tiuj kiuj donas sian vivon por sia propra ŝafaro. Sed tiam Jesuo estas avertanta la ĉefreligiulojn por ke ili ne klopodu repreni la ŝafaron ĉar Dio estas la ŝafisto kaj li ne permesos ke sia ŝafaro, siaj ŝafoj kiujn li tiom amis, por kiuj la ŝafisto donas sian vivon, estu reprenitaj de la falsaj ŝafistoj kaj de la solduloj.

Kaj poste Jesuo blasfemas. Ni troviĝas en la templo de Jeruzalemo, en la plej sankta loko kaj Jesuo blasfemas. “Mi kaj la Patro estas unu”. Jesuo ne asertas, kiel mi vidas en la itala traduko, “ni estas unu nura aĵo”. Jesuo ne priparolas la unuigon, la unuecon kun Dio, sed Jesuo estas asertanta ke li estas Dio, kiel la Patro; “Sola” estis la nomo de Dio, en la libro de la profeto Zeĥarja, ĉapitro 14a versego 9a oni legas: “Lia nomo estos sola”, do Jesuo estas Sola, li estas Dio, kial?

Ĉar en Li manifestiĝas la sama krea ago de la Patro per kiu oni komunikas vivon al la popolamaso. Do Jesuo en la templo de Jeruzalemo blasfemas, Li konfirmas kaj depostulas sian dian kondiĉon. Jen, poste la sekva parto de la evangelipeco diros ke la ĉefoj, la religiularo decidos ŝtonmortigi Jesuon, tamen tiu ĉi ne troviĝas tie en la hodiaŭa liturgio.

Kiam la ĉefreligiuloj troviĝas fronte al Dio ili ne eltenas Lian ĉeeston kaj kial ili decidos mortigi Jesuon? “Ĉar vi kiu estas homo igas vin Dio”.

Tio kio estas la volo de Dio por la tuta homaro, ke la homo fariĝu sia filo, tio estas blasfemaĵo kiu meritas la mortigon je la okuloj de la tuta religia institucio.